



ANTAUJEN

ENHAVO

Januaro - 2003 - N° 29-a
ASTURIO

- 2....Nia Regiono
- 3....Venu!
- 4....Mozaiko
- 5....La Ĵusveninto
- 6....Certeco kaj Dubo
- 7....Yirbaik
- 8....Iom da Etimologio
- 9....Mesaĝoj
- 10-11. Johano
- 12..Katoj
- 13..LGarcilaso de la Vega
- 14..Sanon!
- 15..Amuzajoj
- 16..Proverbaro



**REVUO DE LA AVILESA
ESPERANTO - GRUPO**

Feliĉan Novjaron 2003!



NIA REGIONO

LLANES

Llanes (/janes/, pli malpli) troviĝas je la nordorienta ekstremo de Asturio. Ĝi estas unu el la plej turismaj lokoj de la regiono, kaŭze ĉefe de ĝiaj belaj strandoj, kiuj ankoraŭ estas ĉirkaŭataj de natura areo. Iuj el ili, kiel la fama Gulpiyuri, estas interne de la kamparo, ŝajne sen komuniko kun la maro! Estas mirinde ankaŭ la proksimeco de la montaro Cuera al la marbordo... La ĉefurbo de la municipo de Llanes, same nomigata Llanes, estas bela marhaveno kun elstaraj monumentoj kiel la domo de la Rivero aŭ la palaco de la duko de Estrada.

Du el la plej gravaj monaĥejoj de la oriento de Asturio troviĝas ĉi tie: San Salvador de Celoriu (11^a jarcento) kaj San Antolín de Bedón (12^a jarcento).

La asturaj popularaj tradicioj estas tre vivaj en Llanes. Estas ekzemploj la "oferado de la bukado" farata dum la festoj aŭ la fama danco "pericote" (/perikote/), tre antikva kaj interpretata de du virinoj kaj unu homo.

En Llanes oni parolas la orientan dialekton de la Astura lingvo, en kiu ekzistas la sono /h/ (simile al Esperanto), malpropra al la aliaj dialektoj. En la pratempo, samkiel la plejmulto el la asturaj teroj oriente de la rivero Sella, ĉi tiu teritorio estis loĝata de la kantabroj, tribo malsimila al la asturoj. Iuj fakuloj konsideras ke eble pro ĉi tiu triba diferenco de la loĝantaro aperis la nunaj tri dialektoj de la astura lingvo. Unu fama ŝpuro de tiuj pratagoj estas la idolo de Peña Tu. Ĝi estas desegnaĵo de kio aspektas militisto kun glavo kiu aperas sur granda ŝtono en la loko Puertas de Vidiago –kvankam iuj diras ke temas pri astronaŭto!

Bonvolu ne malprofitu iujn bongustajn manĝaĵojn de la regiono, kiel la fromaĝo Porrúa!

La Redakcio

Estraro de ANTAŬEN

Honora Prezidanto: **Nicolás Muñiz**

Prezidanto: **Cezaro García**

Sekretariino: **M^a Luisa Menéndez**

Direktado kaj Desegno

revuo Antaŭen: **Císimo Rabanedo**

Kasisto: **Luis Gonzalez**

Bibliotekistino: **M^a Isabel Murillo**

Gekomitatoj:

M^a José Alvarez Faedo

Valentín Pérez

Eva González

Gene Alvarez

Lisa Ejarque

Daise Murillo

Nia adreso

Llaranes Poŝtokesto 51 (CP 33460)

AVILÉS Asturias

Tfn 98 554 11 27

esperanto@asturies.org

Depósito legal:

Nº AS 1398 (9)

N.I.F. 33677378

Subvenciita de la Registaro
de la Avilesa Municipio

VENU!

Mia koro dormadis
sen amo nek dolor', kiam vi alvenis
por vekigi ĝin. Ho, mia amatino,
kial vi ĝin vekis?


La trankvila kvieteco
de ĝia sonĝo gloro estis vekiginte;
senti vin, kisi vin kaj poste...
senfina strebo plori

Kial mi vin konis? Kial vi venis
por konfuzi de mia spirito la pacon
se la iluzio vin koninti
distranĉis al mi la animon?

Kial vi vekis
mian koro, kiu vin rememoras malĝoja?
Se ne pro amo, kial vi alvenis?
Kaj se pro amo kial vi foriris?

Venu! Mian animon en tremo
al vi ligas fortoj laĉoj.
Mi volas... ĉiam vin vidi,
ke dormu mia vivado
kvazaŭ infan' en viaj brakoj

Verkis **Luis Menéndez** "LUMEN"
Esperantigis **M^a Luisa Menéndez**





OKAZIS EN PARIZO

Antaŭ cent jaroj oni vendis en Parizo ostrojn por la malriĉuloj. Temis pri recikligitaj konkoj plenigitaj je senegusta masobulo.

ĈIO TAŬGAS

La praloĝantoj de Oceanio uzis sangon kvazaŭ gluon. Ĝia alglua povo devenas de ĝia alta enhavo da albumino.

TAMEN ANIMO RESTIS

La eskimoj havis la kutimon ŝtopi naztruon al la mortintoj (la maldekstran al virinoj kaj la dekstran al viroj) ĉar ili kredis ke la animo foriras tra ili.

DENTAĴ GRAVUROĴ

En la dua mondmilito la usona dentisto Jack Mallory estis trudita forigi la mueldantan doloron de la japana generalo Hideki Tojo, milita malliberulo, post la nordamerika okupado de Japanio. Dum la intervenado la milita dentisto gravuris sur la dentoj de la japano ĉi tiun mesaĝon: "Rememoru Pearl-Harbour-on". Mallory skribis la frazon per morsa kodo kaj sur spaco de 111 mm. larĝe kaj 52 mm. alte.

DAÍSE MURILLO

LA ĴUSVENINTO (3)

Jam delonge mi volis vidi la maron. Mi estis vivinta dum tro da jaroj en loko kie malfacilis al mi atingi la marbordon. Do mi iris en la strandon norde de la urbo, granda sablejo kun kelkaj nomoj. La okcidenta parto estas nomigata Salinas, ŝulde al la tieaj iamaj salejoj. Dum mia infanaĝo, miaj gepatroj kutime portis min tien por trovi riĉan familion de amikoj de mia patro. La edzo estis studinta kune kun mia paĉjo kaj pli bonŝancis en la vivado. Sed mi ne ŝatis iliajn filinojn kaj mi ĉiam preferis iri en la orientan parton, la plaĝo Sankta Johano de Nieva. Tie ofte estis malpli da homoj, ĉar la ondoj estis pli danĝeraj kaj tial la areo pli malŝatata. La lumturo estis proksima kaj dum mia adoleskaĝo mi ankaŭ ŝatis iri tien dum iuj tiel maloftaj kiel plaĉaj romantikaj noktoj

Nun mi vizitis la tutan etendaĵon de la sablejo. Mi malgaje konstatis ke la sablo estas kovrita de gudro, kiel ja oni diris al mi. Petrolŝipo estis fundenirinta antaŭ iuj semajnoj en Galicio kaj ĝia toksa enhavo estis alveninta ĉi tien. Mi vidis strangan birdon, mortinta kaj tute plena je petrolo, je miaj piedoj. Mi telefonis al la oficejo de bestoprotektado kaj ne post multe da tempo fakuloj alportis, batalantoj de la ekologia movado, kiuj tre dankis al mi la vokon kaj kiuj klarigis al mi ke temas pri rara specio kaj ke ili timis ke ne multajn pli ulojn kiel tiuj oni povus jam trovi en tiu zono. Mi ankaŭ dankis ke ili tiom frue venis; mi estis audinta ke, pri ĉi tiu katastrofo kontraŭ naturo la aŭtoritatoj ne estis estintaj tiel pretaj kiel necese. Cetere, mi povis daŭrigi mian promenadon libere. Malantaŭ mi, en la proksima vilaĝo Raíces, mi vidis ĝian konatan rokegon. Oni kredas ke estis tie kie la simbolo de nia lando, la Kruco de la Venko, metala ornamaĵo, estis farita, en la tiama kastelo de Gauzón. Gauzón estis tiam teritorio multe pli granda ol tio kio nuntempe estas nomata Gozón (klara lingva evoluaĵo), apuda municipo oriente de la strando kaj de la enfluejo de la urbo. La sama vilaĝo Sankta Johano de Nieva havas parton en tiu municipo, trans la enfluejo, kaj parto en mia griza, kara kaj nemenciota urbo. Mi nun rememoris amikon kiu diris ke li “memvideble” devenis de Raíces (lia familio apartenis vere al ĉi tiu loko; la ŝerco estas tio, ke Raíces signifas “radikoj”). Kun ĉi tiuj pensoj, mi trovis subite kelkajn konatojn...

DOKTORO ATENDANTO

CERTECO

KAJ

DUBO

Iun matenon, kunveninte Budho kun siaj disĉiploj, alproksimiĝis viro.

-Ĉu Dio ekzistas? –li demandis.

-Li ekzistas –respondis Budho.

Post la tagmanĝo
alproksimiĝis.

-Ĉu Dio ekzistas? –li

-Ne, Dio ne ekzistas

Je la vespero tria
demandon.

-Ĉu Dio ekzistas?

-Vi mem devos ĝin
Budho.

Forinte la viro
indignata:

-Majstro, kia
donas malsamajn
sama demando?

-Ĉar ili estas malsamaj homoj, kaj ĉiu alvenos al Dio per sia propra vojo. La unua havos fidon je mia parolo. La dua faros ĉion ajn por pruvi ke mi eraras. Kaj la tria nur kredas je tio kion li mem kapablas elekti.



alia viro

deziris scii.

–Budho diris.


viro faris la saman

decidi –respondis

disĉiplo komentis

absurdaĵo! Kial vi
respondojn por la

LUDOVIKO



YIRBAIK- BAIK- KAJ ŜIAJ HUNDOJ

Pratempe, kiam multaj bestoj ankoraŭ estis homoj, vivis maljunulino, Yirbaik-Baik (pr. Jirbejk-bejk), kiu posedis grandan aron da dingoĵoj. Dresite ekde sia hundideco, la dingoĵoj estis feroĉaj kaj ruzaj. Laŭ Yirbaik-Baik, la aliaj aborigenoj estis nur manĝaĵo, ĉar ŝi kaj la dingoĵoj manĝis nur homkarnon.

Yirbaik-Baik elpensis multajn planojn por satigi ĉi tian nenaturan malsaton. Unu plano estis vagadi tra la densejo ĝis ŝi renkontis ĉasistaron. Tiam ŝi diris al ili, ke ŝi antaŭ nelonge vidis valabiojn paŝtigantaj ne malproksime, kaj, se ili atendas tie, ŝi pelos la bestojn laŭ tiu direkto. Pretigante lanĉoj kaj bumerangojn, la aborigenoj atendadis ekscitite. Tamen, kiam Yirbaik-Baik aperis, ŝia malsata dingaro akompanis ŝin. Ili ĉirkaŭis la kompatindulojn, ilin mortigis kaj forprenis iliajn kadavrojn al la kamploĝejo de Yirbaik-Baik.

Post iom da tempo la ceteraj aborigenoj sentis la mankon de tia granda nombro de siaj kunuloj. Eltrovinte, kio okazis, ili ĉirkaŭis Yirbaik-Baik kaj ŝiajn hundojn kaj mortigis ilin. Kiam la dingoĵoj mortis, iliajn korpojn ŝanĝigis en tigro-serpentojn kaj forglitis en la veprejon. La kranioj de la mortigitaj aborigenoj estis aliformitaj en blankajn ŝtonegojn, kaj Yirbaik-Baik mem transformiĝis rapide kuris en malaperis.

La eta vidata de homo, Tamen, se, post longa aborigenoj aŭdas ĝian ke ĝi estas Yirbaik-Baik, refreŝigi la sekegan vivantaj kreitaĵoj



en brunan birdeton, kiu la densejon kaj


birdo, malofte kutime pepas nokte. tempo sen pluvo, la krieton dum la tago, ili scias, alvokanta la fulmtondron grundon kaj doni al ĉiuj akvon.

Tradukita de: Peggy Ross, Brisbano
Kunlaborantino: **Jennifer R. Bishop** (Australio)

IOM DA ETIMOLOGIO




Koohi en la japana, kawa en la malaja, gafa en la kamboĝa, koffie en la nederlanda... iu



ajn estu la loko en la mondo, la vortoj por nomi kafon iel similas. Nu, kio estas la deveno de ĝi?



La historiistoj konsentas, ke la provinco Kaffa (Abisenio en la nuntempa Etiopio) estas la devenloko de kafo. Tamen, la deveno de la vorto "kafo" ne rilatas al Kaffa. Ĝi devenas fakte de la araba "qhawa" (stimulilo). Ĝi estas, kiu inspiris al la botanikistoj la latinan vorton



coffea, aplikita ankaŭ al la trinkaĵo farita el grajnoj de kafoarboj kaj tiom disvastigita tra la mondo.



Kunlaboranto: Atilio Orellana Rojas,
2002 (Nederlando)



MESAĜOJ

Nia grupo daŭrigas laborante favore al la disvolvado de Esperanto.

Ni konstatas tion, precipe subtenante la eldonajn de nia revuo, kiu aperas ĉiusemestre de antaŭ kelkaj jaroj.

Ĝi konservas nian ligadon kun geesperantistoj de la tuta mondo. Ĉiuj el ili interesiĝas pri nia modesta laboro.

Ni ricevis de la grupo BEC (Barcelona Esperanto-Centro) de Katalunio du ekzemplerojn de la libro titolita "Esperantismo. Prelegoj kaj Eseoj" skribita de Giordano Moya. La aŭtoro, kune kun sinjoro Aragay, prezidanto de BEC sendis ilin al ni. Kompreneble, ni legis, kun vera emocio, tiel interesan verkaĵon, kiu pligrandigis nian scipovon pri Esperanto.

Ĉijare ni festis la Zamenhofan tagon kune kun niaj geamikoj apartenantaj al la grupo Astura Asocio de la najbara urbo Ŝiŝono (Gijón).

INTERRETO



Rememoru ke vi povas retpoŝti al ni al ĉi tiu adreso:

esperanto@asturies.org

Ni daŭre kuraĝigas niajn anojn uzi ĉi tiun rapidan komunikilon.



Nekrologoj:

Ni, ĉiuj, multe doloras pro la forpaso de nia franca amikino kunlaborantino de nia revuo Ginette Gabillon. Ŝi estis laborema esperantistino en la urbo de Canderan (Bourdeaux).

Ankaŭ ni multe bedaŭris la morton de la edzino de nia rusa korespondanto Ivan Varjuhin loĝanta en Rostov.

JOHANO

Mia amiko Johano ripozas de antaŭ kelkaj en malsanulejo; pli en frenezulejo.

Li jam de infaneco estas amiko mia. Niaj familioj longe najbaris en humila kvartalo.


Johano kaj mi, ekde ekbalbuti duonvortoj, ni interkomunikadon. Niaj pri kia ajn afero ĉiam kvazaŭ fratoj. Eĉ ni ankoraŭ ĝemeloj. Ĉu li sidiĝis ĉe vesper aŭ noktomanĝi, ĉu Neniam ni kverelis.

Tamen, pri io ni Jen kio: mi konsideras ke normala kiel ĉiu alia mankis sufiĉan li, jam en tiu frua aĝo,

ceteraj kunuloj kiel stranga specimeno ĉar, dum ni ludadis pilkon, ekzemple, li interesiĝadis pri la solvo de ĉiaspecaj enigmoj, hieroglifoj aŭ malfacilaj algebraj problemoj.


Venis juneco. Li, bonega studento, sukcesis atingi elstarajn kvalifikaĵojn en gimnazio, ĝis la punkto ke oni lin premiis per stipendio por studi karieron. Li elektis sciecan karieron. Li fariĝis fizikisto kaj jen li denove atingis la plej elstarajn kvalifikaĵojn en tiu specialaĵo. Li, kompreneble, havis nenian malfacilaĵon por trovi laboron en ŝtata entrepreno.

Lia vivo disvolviĝis dum tempo kontentige, sen teknikaj, familiaj aŭ ekonomiaj problemoj.



monatoj konkrete, respektivaj unuetaĝa dometo de

kiam ni ankaŭ kapablis komencis senpaŭzan impresoj, opinioj, decidoj koincidis. Ni kreskis pli kuraĝus diri, kvazaŭ nia manĝotablo por tag, mi en tiu de liaj gepatroj.



tute ne koincidis. nia infaneĝo estis samaĝulo, kiam ĉiam libertempon por ludi; montriĝis antaŭ la

Mi, kvankam ne tiel elstara studento kiel mia amiko Johano, sukcesis fini karieron pri juro. Mi fariĝis advokato.

Post paso de l' tempo niaj vojoj diverĝis. Kvankan nia amikeco ne malpliĝis, niaj respektivaj filozofioj pri la vivo fariĝis malsamaj. Mi kapablis adaptigi pli dece ol li al ĉi tiu ĝangalo kia estas nia moderna socio, kie la plej multo el la homoj triumfas dank' al intrigoj, perfidoj, mensogoj, malhelpoj... Li ĉion deziris organizi, kontroli, analizi, sen konscii pri la neebleco de tia grava tasko.

La novaj teknikoj alportis novaĵojn, kiuj paradokse, ankaŭ alportis novajn problemojn. Alvenis komputilojn pli kaj pli komplikaj, kiuj altrudis specialajn zorgojn por solvi la novajn kreitajn bezonaĵojn de la socio.

Estis necese ke li dediĉu parto el lia libertempo por pli akurate adaptiĝi al la novaj teknologio kaj, konsekvence, al la progreso. Li estis devigata lerni kaj memori grandan kvanton da anglaj vortoj rilatantaj al la argoto de tiuj komputiloj. Krom tio, la formado de novaj ĉiaspecaj entreprenoj, societoj, organizacioj, k.a., okazigis malfortigon al tiu ne antaŭ longe privilegia cerbo. Johano, kiu kapablis realigi komplikajn matematikajn ekvaciojn sen ia helpo ke lia cerbo, lia eksterordinara memoro, finfine devis cedi pro nekapableco por kontroli parto el tiuj centoj, miloj, eble milionoj da sigloj de tiom granda nombro da naskiĝintaj societoj.

Lia menskapablo tagon post tago difektiĝis. Ne sufiĝis la kuraĝaj vortoj de liaj familianoj kaj geamikoj. Lia cerbo ribeliĝis, ĝi ne akceptis la novan situacion, for de ĝia kontrolo.

Konsekvence de tio, lia sanstato malpliboniĝis ĝis finfine liaj familianoj decidis internigi johanon en frenezulejo.

De tempo al tempo mi vizitas mian karan amikon kvankam mi ege suferas vidante lin tiele. Li, bedaŭrinde, ne rekonas al mi, malgraŭ tio ke mi citas lokojn, situaciojn, anekdotojn de niaj infaneco kaj juneco. Li nur stulte ripetadas:

APA, ADAPPA, MAPA; EPA, PEPA; ORA, OSPA, OPA, k.a. (1)

(1) Temas pri sigloj de societoj aŭ organizacioj ekzistantaj en Asturio.

ADOLFO



KATOJ

Hodiaŭ estas malgaja tago. Merry, mia kato, mia maljuna amiko, ĵus min forlasis. Urtzi, lia “frato”, ne komprenas ke li ne revenos, ke morto kunportas la definitivan



adiaŭo kaj li iras laŭ la domo snufante je la anguloj, serĉante lin. Iam li miaŭas mallonge, kvazaŭ frustrante kaj en liaj okuloj

demando estas desegnata. Ĝi estas domaĝo. Okazas ke ĉio pasas tiel rapide... Mi ankoraŭ rememoras kiam li venis al ni; li estis malgranda kaj timigata katido, en kartonskatolo kiu tuj nepriĝis por ĉiuj. Restas al mi almenaŭ la konsolo ke dum la lastaj jaroj, trovis flanke de ni

la korinklinon kaj zorgon kiujn ĉiu estulo meritas. Kiel malsama lia vivado al tiu de tiomaj strataj katoj kiuj mortas pro malvarmo aŭ soifo en niaj urboj. Kvankam ŝajnas strange, ne estas ankoraŭ hontiga ĵeti ŝtonojn al katoj, lasi ilin morti pro malsato aŭ tretitaj de la aŭtomobiloj.



povas esperi de lando kiu malhavas veran leĝaron pri protekto kaj respekto al la endomaj bestoj? Igho kulpas pri la vagado de centoj da malsanaj katoj. Neniu rememoras ke dank'al iliaj prauloj ekestis gravaj civilizacioj kiel ekzemple la egipta, kies prosperado dependis de la riĉeco de la rikoltoj, kaj estis juste kato kiu, evitante la ratplagojn, helpis teni la ekonomion.

Malĝojigas min tiuj homoj kiuj mokas mian tristecon.

Ĉu plori pro kato?

Dio faris katon


karesante

estas vera,

plaĉon pro

eble ne

kiu



ĴKia stultaĵo! Oni diras ke por tio, ke homo povus ĝuitigron. Mi ne scias ĉu ĉi tio sed tiuj kiuj neniam havis la ronrono de kato dum



ĝuas la elastecon de siaj korpoj nek karesate gravigas la montron de amemo kaj dankemo antaŭ la mano oferas al ili la pledon da manĝaĵo ne scias, kio malvicas al ili.

Je la memoro de Merry, mia siama kato.

Teresa Rodriguez.

Garcilaso de la Vega

La liriko de Garcilaso havas la brilan riĉan enhavon de la belaj temoj, la novajn konceptojn pri amo kun nuancoj de certa platona idealis-mo, kaj ankaŭ, elirintan rekte el lia propra malfeliĉa koro, realan sincerecon por esprimi la doloran senton, kiu premis lian spiriton pro certa granda amo kiun li sentis, sen la koncerna reciproko de la amatino, ama sento kiun li tiel majstre sciis esprimi. Rimarkindas, lia inklino por naturo, kiun li en siaj poemoj ofte uzis, kvazaŭ alian protagoniston de la dramo kiun li poezie rakontas, kiel estas konstateble en tiu ĉi fragmento de la "Unua Eglogo":

La sun' etendas siajn orradiojn
 sur helaj montoj kaj brulantaj valoj,
 vekante homojn, bestojn kaj la birdojn
 kiuj ekflugas super la altaĵoj:
 super la verdaj kampoj kaj montpintoj
 kie montriĝas belo kun spontano.
 Dum birdoj tion faras
 laŭ tasko ordinara
 al kiu sia mem natur' inklinas
 ĉiam l' animo mia triste larmas,
 kiam la ombroj ĉion sombre nigras
 aŭ venas lum' kun siaj heloj klaraj,
 tiam, galope fluas larmoj miaj...

Pli frue ol Garcilaso, neniu poeto kantis en la kastilia lingvo la malfeliĉojn de amo profunde sentita aŭ la mil diversajn sentojn de ideali-gita amo, kiel oni povas legi en sama citita eglogo:

Kunlaboranto:

Antonio Marco Botella (Zaragoza)

SANON!

Pensoj de senmalica kuracisto

Kutime, en nia okcidenta kulturo, oni kredas ke la malsano estas aĵo kiu dependas surtute de la hazardo (la plejparto de la kronikaj malsanoj) aŭ eble de io kio alvenas kiam oni kontaktas kun malbona bakterio aŭ viruso (infektaj malsanoj). Kaj preskaŭ ĉiam, ni vidas ĝin kiel paneo kiu la kuracisto devas ripari; eble, hodiaŭ, miloj da homoj vizitas siajn kuracistojn kun diabeto, kronika dispepsio, sendormeco, depresio, kronika kapdoloro... kaj li, ofte rapide, ripetas la riton, la ceremoniajn vortojn: "prenu tiujn medicinaĵojn... (eble dum la tuta vivo!).

Ĉu vi imagas la kuraciston, sincere, kore, demandante:

Kiel estas via vivo kiam vi sentas bone?; kiel vi sukcesas senti bone dum tiuj tagoj?;

Ĉu vi sentas vian malsanon ankaŭ kiam vi estas feliĉa?

Ĉu vi sentas vian malsanon ankaŭ kiam vi ne fumas, kiam vi ne tro drinkas alkoholaĵojn?

Kion vi manĝas kutime?

Ĉu vi estas feliĉa aŭ io malkontentigas aŭ maltrankviligas vin?

Ĉu vi amas iun?; ĉu vi sentas vin amata?

Ĉu vi havas personojn kiuj helpas vin, kiuj apogas vin?

Kion diras via kapo, via stomako... kun ĝiaj simptomoj?; kion ĝi demandas?; kion ĝi necesus?

Kiel vi volas solvi tiun problemon?; kion vi deziras fari?

Kion volas fari via korpo, kion necesas via animo?

Kio estas la ŝanĝo ke via vivo necesas nun...?

Kiel mi povus akompani vin en tiu proceso?... Mi ŝatus akompani vin... se vi volus...

Tro da demandoj neniam faritaj!

Kiom da malsano oni povus kuraci kaj surtute antaŭrimedi, respondante tiujn demandojn!

Jes; ofte, la malsano ne estas la malamiko kiu mi devas silentigi per medicinaĵoj dum mia tuta vivado... Eble ĝi estas nur amoranta signalo kiu montras al mi kiel mi necesas prizorgi mian korpon, mian animon, miajn rilatojn... Eble mi nur necesas bone dormi, manĝi multajn fruktaĵojn kaj legomojn, eble ke iu komprenu kaj akompanu mian malkontentecon, eble pli bone prizorgi (aŭ rompi!) miajn malfeliĉajn rilatojn, aŭ nur ŝanĝi iomete etajn kutimojn, eble mediti ĉiutage, aŭ promeni ofte, aŭ ne fumi, eble ke iu memorigu al mi miajn multajn eblecojn esti feliĉa, pli bone zorgi pri mi mem...

Jes, ankaŭ la malsano de la popoloj estas ofte signalo..., signalo kiu montras kiel la bona nutrado, la riĉeco, la egaleco, la humaj rajtoj, la kulturo estas forgesitaj... kaj, kiel ĉiam, anstataŭigitaj de la milito, la virina diskriminacio, la sovaga ekonomio, la profito de la riĉuloj...

Sanon... por ĉiuj! Ĝis la revido!

Se vi volas paroli aŭ demandi pri ĉi tiuj temoj, poŝte aŭ en la revuo, bonvolu skribi al mi aŭ al la redakcio...

Dankon!

Valentín Pérez. C/ San Isidro 16, 1º A. Lugo de Llanera. 33690. Asturias. España.

Retadreso: cavayoloco@hotmail.com



Amuĵoj

CÍSIMO



Demandas viro ĉe lito en hospitalo

-Ĉu ekzistas ankoraŭ iu espero?

-Ne -respondas doktoro.

-Via bopatrino estas entute sana.

Květa kaj Jaromir (Ĉeĥa respubliko)

Kio rakontas la veron, kvankam ĝi nenion

-Ĉu Karlo vere estas mia duonfrato?
-Jes, karulino
-Nu, kie estas la alia duono?

La pezilo
Sylvia Hämäläinen (Finnlando)

Ŝi- Renkontu min ekster la
kinejo je la sepa.
Li- Certe. Kiam vi venos.

Viro rigardis valizon en butikio.

La butikisto diris al li.

-Ĉu vi deziras ĝin?

-Por kio? Diris la viro.

-Por enmeti viajn vestojn.

-Sed tiam mi estus nuda.

Edziĝonto- Ĉu vi seniluziiĝus, se mi
konfesus, ke mi havas artefaritajn
dentojn?

Edziniĝonto- Tute ne, karulo. Almenaŭ
nun mi povas depreni mian perukon,
mian ŝveligeblan mamzonon, vitrookulon
kaj ligna kruron.

Sur recepto, la kuracisto skribis
instrukciojn pri dieto por ke la paciento
ne forgesu. La paciento rigardis la
recepton kaj demandis.

Doktoro, ĉu oni devas preni ĉi tiun
dieton antaŭ aŭ post la manĝado?

-Patro, kie vi naskiĝis?

-En Danzig karulo

-Kaj kie naskiĝis Panjo?

-En Londono

-Kaj mi?

-En Parizo

-Kiel mirinde, ke ni ĉiuj renkontis
unu la aliajn

Patricia Harkin (Australio)

PETAĴO

Mi petas humorajojn el diversaj landoj por
Publikigi en ĉi tiu revueto. (mi antaŭdankas)
Sendu al:

CÍSIMO R. SIMÓN
c/ La magdalena nº 26 - 1º D



**INTER STELO
KAJ ŜTELO
ESTAS PLI OL
NUR ĈAPELO**

**KION NI HAVAS,
POR NI NE VALORAS,
KIAM NI ĜIN PERDIS
NI PLORAS**